

Ekumenaj Bibliaj Tagoj en Baia Mare

Oldřich Arnoř Fischer – Gabriella Stier

Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 4-an de majo 2016

Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) estis fondita en la jaro 1911 (antaŭ 105 jaroj). Tiu ĉi internacia organizacio de kredantoj (katolikoj kaj nekatolikoj) havas celon krei efikajn kontaktojn inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo. Oficiala organo de KELI estas la ĵurnalo Dia Regno, kiu estis fondita en la jaro 1908. Kelianoj aranĝas kongresojn kaj bibliajn tagojn, kiuj estas internaciaj agadoj de kredantaj esprantistoj. Ili partoprenadas ankaŭ en ekumenaj renkontiĝoj kune kun membroj de katolika internacia esperantista organizacio Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE).

Rumana urbo Baia Mare (hungare Nagybánya) estis loko, kie ekde la 6-a ĝis la 10-a de aprilo 2016 okazis Ekumenaj Bibliaj Tagoj.

Mia edzino Gabriella, Pavel Polnický kaj mi tien veturis perbuse el rumana urbo Satu Mare (65 km).

Bibliajn Tagojn aranĝis Mária László kun helpo de siaj fratino Ildikó Tereza Scurt kaj nepino Helga Vanessa Tontea, Brigitte Horváth kaj muzikisto Stefan Lepping. Programo por 16 partoprenantoj el kvin eŭropaj landoj (CZ, DE, IT, RO, SK) estis bonege preparita.

Plimulte da tempo ni travivis en romkatolika paroĥejo kun kapelo, prelegejo kaj matenmanĝejo, pri kiu zorgas pastro Jenő Magász. Loĝado estis por plej multaj en hotelo en piedira distanco de 10 minutoj, tie ni ĉiuj ankaŭ tagmanĝis kaj vespermanĝis.

Merkrede, ĵaŭde, vendrede kaj sabate la tago komenciĝis per rozaria preĝo je la 7-a horo kaj sankta meso en la kapelo. Komuna matena preĝo kaj matenaj laŭdoj malfermis novan tagon, kiu alportis al ĉiuj partoprenantoj novajn travivaĵojn en amika etoso. La partoprenantoj povis aĉeti librojn, inter ili satiran komedion de Blanka Fiřerová „Ĉerkoturneo“. Unu persono de la komedio, malsprita urbestro, ateisto, ordonas al sia sekretariino trovi rapide koncizan enhavon de tuta Biblio sur interreto... Sed la Biblio ne estas facila legaĵo kaj tial ni devas lerni la Biblion legi kaj kompreni.

Post matenmanĝo kaj komuna kantado komenciĝis prelegoj pri profeto Jesaja. Pastro Wilibald Kunigk kaj pastoro Wolfram Rohloff prelegis unufoje en prelegejo, sed la prelegejo estis malvarma kela ĉambro, tiam lastajn prelegojn ni aŭskultis en ĝardeno de la paroĥejo.

La [libro Jesaja](#), kiu estas parto de Malnova Testamento, enhavas 66 ĉapitrojn. Kiu estis Jesaja? Lia nomo hebree signifas „la Eternulo savos“, „la savo apartenas al la Eternulo“. Li naskiĝis ĉirkaŭ la jaro 765 antaŭ Kristo kaj laboris en la jaroj 735-701 a. K., dum regadoj de la reĝoj Aĥaz kaj Hizkija. Li estis verkisto, poeto kaj politikisto, proksimulo de reĝaj kortoj. Li vivis dum regadoj de kvar reĝoj: Uzija (773-757), Jotam (757-742), Aĥaz (742-726) kaj Hizkija (725-697). Lia morto estis martira. Laŭ juda legendo li estis distranĉita per segilo.

En la jaro 722 a. K. la regno estis dividita en du partojn. Super norda regno Izraelo (kun ĉefurbo Ŝekemo, poste Samario) regis Jeroboamo, kaj super suda regno Judejo (kun ĉefurbo Jerusalemo), regis Rehabeam, filo de Salomono. Ambaŭ partoj de la regno neniam plu unuiĝis. En la jaro 722 a. K. la norda parto (Samario) estis konkerita de asiria reĝo Sargono II, kiu plimulte da judoj (27 000 personojn) forkondukis en Asirion.

Aĥaz faris kontrakton kun egiptia faraono Ŝabako kaj sukcese defendis Jerusalemon kontraŭ Sargono II (Ŝarukeno) kaj lia filo, asiria reĝo Sanĥerib. Kiam potenca Sanĥerib volis

konkeri Jerusalemon, li perdis 185 000 soldatojn, kiuj subite mortis, verŝajne de rapida, perakuta formo de pesto (2 Reĝ 19, 35-37).

Jesaja en sia libro kritikis maljustecojn kaj esprimis sian esperon per profetaĵo pri alveno de Mesio (Jesuo Kristo). Lia libro komenciĝas per profetaĵoj, sed ankaŭ per kritiko de izraelanoj, kiuj ne kredas je la Eternulo, ne respektas Lian leĝon (Jes 5, 8-24) kaj serĉas savon en falsaj certecoj kaj iluzia sento de sekureco (Jes 3, 16-17, Jes 32, 9-14).

Oni diras, ke Jesaja estas la aŭtoro de nur unu triono de la libro, aliajn du trionojn verkis liaj lernantoj kaj posteuloj, kiuj volis pligrandigi mesaĝon de la profeto.

Jesaja havis bonan rilaton al reĝo Ĥizkija. La reĝo malsaniĝis kaj preskaŭ mortis. Kiam li resaniĝis, li montris al babilonaj senditoj ĉiujn siajn trezorojn (Jes 39, 1-4). Jesaja lin avertis kaj profetis babilonan atakon (Jes 39, 5-7). En la jaro 597 babilonanoj (la reĝo Nabukodonozoro) konkeris Jerusalemon kaj forkondukis 10 000 judojn. En la jaro 587 ili denove konkeris Jerusalemon, neniigis templon de Salomono kaj forkondukis 70 000 judojn.

Jesaja havis por judoj grandegan signifon, ĉar li montris al ili, ke kreanto de ĉio estas la Eternulo (Jes 40, 12-24) kaj nur Li estas konsolo (Jes 40, 25-31).

Tagmanĝoj kaj ĉiuj aliaj manĝaĵoj prezentis al ni sanan rumanan kuirejon – rumanoj vere scias bonguste kuiri!

Posttagmeze kaj vespere ni povis ekkoni la urbon. La urbo situas ĉe la bordo de la rivero Sasar (Săsar). Rumanoj permesis al aŭstralia ekspluatista kompanio Esmeralda ekstrakti oron per cianido. El la cianido rapide liberiĝas hidrogena cianido (HCN), kiu estas unu el la plej danĝeraj venenoj, ĉar blokas enzimojn, kiuj estas necesaj por spirado. La 30-an de januaro 2000 solvo de la cianido kaj pezmetalenhava poluita akvo (100 000 m³) verŝiĝis en rivereton Lăpuș (Lapuș), kaj poste en Someșon (Someș) kaj Tibiskon. Ekologan katastrofon transvivis eĉ ne bakterioj kaj la veneno estis trovita eĉ en Danubo en Kroatio. La kompanio neis, ke ĝi scias, kial pereas fiŝoj en rumantaj kaj hungaraj riveroj, sed en februaro 2000 rumana registaro devis oficiale komuniki la katastrofon. (En Slovakio simila katastrofo okazis en aŭgusto 1971 apud la vilaĝo Horná Ves en la distrikto Žiar nad Hronom. La saman danĝeran metodon – la ekstraktadon de oro per cianido – volis uzi usonanoj en Ĉeĥa Respubliko, en montaro Ŝumava!)

En centro de la urbo estas placo, kie Mária László konatigis nin kun historio de la urbo.

La urbo Baia Mare situas en la nord-okcidenta parto de Rumanio, ĝi estas la ĉefurbo de distrikto Maramureșo (Maramureș). La urbo troviĝas en la altitudo 228 m, en la baseno Baia Mare, apud rivero Sasar (Săsar), ĉe la piedo de monto Gutin (Gutâi).

La urbo estis menciita jam en la jaro 1142 dum la reĝado de Geza la 2-a. Tio estis signifa minista centro, kie virinoj en loka rivereto tralavadis sablon, kiu povis enhavi oron. Tial la urbo estis nomita Rivereto de Sinjorinoj (latine Rivulus Dominarum, hungare Asszonypataka, rumane Cetatea Râul Doamnelor kaj germane Frauenbach).

Ĉefa skribita dokumento pri la ekzisto de la urbo Baia Mare devenas el la jaro 1327.

La dokumento de la reĝo Ludoviko la 1-a (Nagy Lajos, Ludoviko la Granda, 1326-1382) el la jaro 1347 enhavas privilegiojn, difinitajn rajtojn kaj devojn de la libera reĝa urbo Baia Mare. La privilegia letero certigis plenrajtan aŭtonomion por la civitanoj de la urbo. Ĉi tiu privilegio kaŭzis rapidan evoluon de la urbo kaj prosperon de la mineja industrio.

Kulturan kaj materialan evoluon de Baia Mare dum tuta ĝia historio determinis ĝia mineja industrio. Tiamaj loĝantoj estis germanaj metiistoj, ministoj kaj komercistoj, kiuj havis gravan rolon en la gvidado de la urbo.

Patrono de la urbo estis la hungara reĝo Stefano la 1-a (Szent István, 967-969?-1038), kiu estis fondinto de hungara sendependa ŝtato. Fama gotika preĝejo, kiu estis konstruita en la 14-a jarcento, portis lian nomon. Nuntempe tie ekzistas nur Turo de Sankta Stefano (pli ol 40 m).

En la komenco de la 15-a jarcento, dum reĝado de Sigismondo Luksemburga (1368-1437) (Luxemburgi Zsigmond), la urbo perdis karakteron de libera reĝa urbo, ĉar la reĝo donacis la urbon al serba despoto Stefano Lazareviĉ (Stjepan Lazarević, 1389-1427), kiu la urbon profituzis.

Ekde la jaro 1445 la urbo iĝis propraĵo de gubernatoro Johano Hunjadi (Hunyadi János, 1400-1453), kiu vizitis ĝin kaj konstruigis en la ĉefplaco domon por sia edzino, bonstatan ĝis nun. Johano Hunjadi ordonis la konstruadon de sonorilega turo apud la jam ekzistanta granda preĝejo de Sankta Stefano. Dum lia reĝado evoluis la minekspluatado.

Same en la tempo de reĝado de Matiaso Korvino la 1-a (Hunyadi Mátyás, 1443-1490) plifortiĝis la mineja industrio (oro, arĝento, kupro, plumbo). Dum lia reĝado pli multe ol duono da oro kaj arĝento de tuta Hungara Reĝlando devenis el ĉi tiu regiono.

Kaŭze de atakoj de moldovaj rumanoj Matiaso Korvino la 1-a permesis al urbanoj konstrui murojn, fosaĵojn kaj bastionojn ĉirkaŭ la urbo. Ĉiuj metiistoj havis sian propran bastionon, kiun konstruis kaj defendis. El ĉi tiuj fortikaĵoj restis nur la Bastiono de la Buĉistoj.

En la 15-a jarcento elformiĝis gilda sistemo. Tio signifis, ke tajloroj, buĉistoj, potfaristoj, peltistoj, seruristoj kaj aliaj metiistoj formis profesiajn asociojn. Gildaj majstroj apartenis al la plej riĉaj civitanoj kaj partoprenis en la gvidado de la urbo. En la urbo laboris famaj oraĵistoj. En la 14-a jarcento la urbo jam uzis sian propran monfarejon. De la 14-a jarcento devenas okangula stampilo, kiu prezentas 2 ministrojn antaŭ la mineja enirejo kaj en la supra parto la reĝon Sankta Stefano, kiu sidas sur la trono. La sigelo havas surskribon „La plej granda forto de la urbo Rivulo Dominarum estas la amo inter la civitanoj“.

Post la morto de Matiaso Korvino la 1-a (1490) kaj kreado de Transilvania Princlando (1541), la reĝo Ferdinando la 1-a (1503-1564), Johano la 1-a (Szapolyai János, 1487-1540) kaj iliaj posteuloj luktis por la akirado de ĉi tiu mineja regiono. La urbo Baia Mare unue iĝis la propraĵo de Ferdinando la 1-a, poste en la fino de la 16-a jarcento de familio Báthory, kiu ludonis la minojn kaj la monfarejon. La luantoj (familioj Herberstein kaj Lisibon) faris raban mastrumadon, havante la celon akiri pli multe da profito, neglektis la evoluigon de la minejoj, ekspluatit la ministrojn.

En la jaro 1620 la princo de Transilvanio Gabrielo Betleno (Bethlen Gábor, 1580-1629) donacis la luan rajton al la urbo. Tiel la urbo akiris grandan enspezon. Tiam en la urbo funkciis jam 3 minejoj.

La loĝantoj okupiĝis ankoraŭ pri produktado de fruktoj (vinbero, kaŝtanoj) kaj komerco.

En la 17-a jarcento la urbo kune kun minejoj fariĝis propraĵo de Georgo Rákóczi la 1-a (Rákóczi György la 1-a, 1593-1648) [ra:ko:ci] kaj poste de lia filo Georgo Rákóczi la 2-a (Rákóczi György la 2-a, 1615-1660).

La urbo travivis multe da sortoturniĝoj. En la jaro 1660 turkaj taĉmentoj forbruligis la ĉirkaŭajn vilaĝojn. Baia Mare eskapis nur tiel, ke pagis 10 000 talerojn (pactributon) al turkoj. Urbanoj devis pruntepreni monon por la pactributo kaj la ŝuldon povis repagi eĉ ĝis la jaro 1737, dum pli ol 100 jaroj.

Poste la urbon okupis aŭstra imperiestra armeo, kiu utiligis ĝian defendan sistemon.

Loĝantoj de la urbo partoprenis en batalo por libereco subgvide de Francisko Rákóczi la 2-a (II Rákóczi Ferenc, 1676-1735) kontraŭ aŭstra superregado.

En la jaro 1848 la urbo subtenis la hungaran revolucion. Ludoviko Kossuth (Kossuth Lajos, 1802-1894) estis promociita honora civitano de la urbo. La generalo Jozefo Bem (Bem Zachariasz Józef, 1794-1850) de ĉi tie ekiris kun taĉmento okupi Kluĵon (Cluj-Napoca). Post malvenko de la batalo por libereco (1849) multe da revoluciuloj trovis kaŝejon en Baia Mare.

En la jaro 1547 estis fondita Schola Rivulina, la unua reformita kolegio de Transilvanio, Partiumo (kaj Rumanio), kiu funkciis ĝis la jaro 1755.

Inter la jaroj 1717-1720 jezuitoj konstruis la barokan preĝejon de Sankta Triunuo, apud kiu ili fondis la lernejon Residentia.

En la jaro 1797 ekzistis en la urbo jam du teatraj trupoj (hungara kaj germana).

Inter la jaro 1896 kaj la dua mondmilito Baia Mare estis fama pri ŝia pentrarta lernejo. La lernejo kolektis la elstarajn hungarajn pentristojn (Simon Hollósy (1857-1918), István Réti (1872-1945), Károly Ferenczy (1862-1917) k. a.).

Dum socialisma reĝimo estis konstruitaj novaj loĝkvartaloj, evoluigita peza industrio, kaj nombro de loĝantoj kreskis de la 18 000 je 170 000 loĝantoj. Ŝanĝiĝis naciaj proporcioj, hungaroj fariĝis etna malplimulto.

Post la ŝanĝo de reĝimo (1989) estis fermitaj multaj minoj, la peza industrio estis neniigita kaj multaj loĝantoj elmigris en fremdajn landojn aŭ proksimajn vilaĝojn. La ĉefa ekonomia forto fariĝis la komerco.

Vendrede ni vizitis ortodoksan monaĥinejon Bârsana, kiu estis fondita en la jaro 1993.

Sur pordo de la monaĥinejo estas skribita: „Ĝi estas nenio alia ol Domo de Dio, kaj ĉi tie estas la pordego de la ĉielo. Genezo 28, 17“. Malantaŭ la pordo estas grandega ĝardeno kun lignaj konstruaĵoj. Ĉie estas videblaj rezultoj de laboro de monaĥinoj kaj helpantoj.

Survoje ni vizitis ankaŭ la vilaĝon Surdești [surdešt], kie estas ligna preĝejo el la jaro 1766 kun la plej alta ligna turo en Eŭropo (54 m).

Sabate ni vizitis rumanajn ortodoksajn kristanojn. Post tio ni kun Wolfram Rohloff festis luteranan diservon kun Sankta Manĝo en la kapelo en Stefana Turo. Vespere ni aŭskultis koncerton en katolika preĝejo. Bedaŭrinde la tempo en Baia Mare pasis rapide kaj jam alvenis sabata adiaŭa vespero.

Dimanĉe ni partoprenis esperantlingvan sanktan meson en preĝejo de Sankta Jozefo.


Laŭ nia opinio la Bibliaj Tagoj estis sukcesaj. La prelegoj estis interesaj kaj valoraj, la ekskurso mirinda. Partoprenantoj estis enkondukitaj en la mondon de la ortodoksio kaj konatigitaj kun maramureŝa regiono kaj lignaj preĝejoj. La urbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon bone prezentis Mária László, Gabriella Stier, loka esperantisto Emil Crâncău, katolika pastro Román János kaj ortodoksa pastro. Ortodoksaj ĥorusanoj, kun kiuj ni neformale renkontiĝis en Baia Mare, estis amikemaj kaj gastemaj.




































Inter ni, 16 esperantistoj, regis la familiara etoso, ni sentis tion precipe dum tagmanĝoj kaj vespermanĝoj, kiam ni ĉirkaŭsidis la rondan, grandan tablon kaj libere babiladis.

Danke al oferema laboro de organizantoj de la Bibliaj Tagoj en Baia Mare 2016 ni denove povis iomete proksimiĝi al la Vero.

Rekomendita literaturo

- AŬTORA KOLEKTIVO 1993: Bible. Pismo svatě Starého a Nového zákona (včetně deuterokanonických knih). Ekumenický překlad. 3-a eld., Český Těšín, Česká biblická společnost 1993, 283 paĝoj. [*Biblio. La Malnova kaj Nova Testamento kun la Duakanonaj Libroj; ĉeĥe*]
- AŬTORA KOLEKTIVO 2006: Biblio. La Malnova Testamento tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof kun la Duakanonaj Libroj tradukitaj de Gerrit Berveling. La Nova Testamento tradukita de la Brita Komitato (John Cypryan Rust, B. John Beveridge, C.G. Wilkinson). 1-a eld., IKUE kaj KELI, Dobřichovice, Kava-Pech 2006, 1375 paĝoj. [*esperantlingve*]
- AŬTORA KOLEKTIVO 2014: Piața Cetății, Baia Mare, 1-a eld., Municipiul Baia Mare, 80 paĝoj.
- DORAZIL, O. 1997: Světové dějiny v kostce. 4-a eld., Vimperk kaj Rudné u Prahy, Papyrus kaj Jeva, 536 paĝoj.
- FISCHER, O.A. 2013: Libro de libroj, <http://www.medy.cz/brno-esperanto/fischer-libro-de-libroj.pdf>.
- FISCHER, O.A. 2016: Pestoj – malsanoj de homoj kaj bestoj, <http://www.literatura.bucek.name/brno/fischer-pestoj>.
- FIŠEROVÁ, B. 2015: Ĉerkoturneo. 1-a eld., Brno, MSD, 58 paĝoj. ISBN 978-80-7392-242-9.
- FOUILLOUX, D., LANGLOIS, A., LE MOIGNÉ, A., SPIESS, F., THIBAUT, M. & TRÉBUCHON, R. 1992: Slovník biblické kultury. 1-a eld., Prago, Ewa Edition, 320 paĝoj.
- IKUE & KELI 2001: Adoru, Ekumena Diserva Libro, 1-a eld., Ponto, CIP-Titelaufnahme der Deutsche Bibliothek, 1422 paĝoj. ISBN 3-9803793-5-3.
- KOVÁCS, J. 1988: Fatemplomok Máramarosban, 1-a eld., Budapest, Építésügyi Tájékoztatási Központ, 73 paĝoj.
- LEPPING, S. 2016: Bibliaj tagoj en Baia Mare. Dia Regno, 2: 41-43. ISSN 0167-9554.
- MÓRICZ, Z. 1908: Nagybánya. Szatmár Vármegye, Szerkeszti Dr. Borovszky Samu, 1-a eld., Budapest, Országos Monográfiai Társaság, 613 paĝoj.
- PASCARU, M. & ANDREESCU, F. 2012: România. Mănăstiri și biserici din România. 1-a eld., București, Ad Libri, 64 paĝoj. – ISBN 978-606-8050-45-4.
- STUBHANN, M. k. a. 1992: Encyklopedie Bible, A-L. 1-a eld., Bratislava, Gemini, 3-351.
- STUBHANN, M. k. a. 1992: Encyklopedie Bible, M-Ž. 1-a eld., Bratislava, Gemini, 353-740.



<p>Pulzo</p> 	<p>Preĝejo de hungara reformita eklezio</p> 	<p>Placo en Baia Mare</p> 	<p>Mario Lăzăreț rakontas al ni pri historio de Baia Mare</p> 	<p>Bazono de Baia Mare</p> 
<p>Antaŭa kafejo (Eliška Tenaxa Sturt, Gabriela Sîrbu, Maria Lăzăreț, Florența Tîrziuță kaj Irina Corvelli-Corvelli)</p> 	<p>Antaŭa kafejo (Karl-Heinz Schaeffer, Hedwig Schaeffer, Pavel Petriș, Stefan Lepping, Felicia Șoșolima, (Wolfram Robloff))</p> 	<p>Bivero Saĝar</p> 	<p>Gabriela rakontas pri preĝejo de la Sankta Triono</p> 	<p>Sonotila ludo</p> 
<p>Romkatoлика preĝejo de la Sankta Triono</p> 	<p>Ortodoksa preĝejo</p> 	<p>Rumana lando kun florantaj arboj</p> 	<p>Pordego de ortodoksa monaĥinejo Bărsana</p> 	<p>Monaĥinejo Bărsana</p> 
<p>Ortodoksa monaĥinejo Bărsana</p> 	<p>Ortodoksa monaĥinejo Bărsana</p> 	<p>Profesoro Irină Căciulea rakontas al Hedwig Schaeffer, Karl-Heinz Schaeffer, Maria Lăzăreț, Pavel Petriș kaj Irina Corvelli-Corvelli</p> 	<p>Preĝejo en monaĥinejo Bărsana</p> 	<p>Preĝejo en monaĥinejo Bărsana. Fajlo de la Sankta familio en Egiptio.</p> 
<p>Monaĥinejo Bărsana</p> 	<p>Monaĥinejo Bărsana</p> 	<p>Heteroptero kuglozo eksteris kaj papilio Goniopteryx rhamni</p> 	<p>Konstruado de nova domo en la monaĥinejo</p> 	<p>Preĝejo de ĉefanĝeloj Miĥailo kaj Gabrielo en la vilaĝo Surdești</p> 
<p>Turo de preĝejo de ĉefanĝeloj Miĥailo kaj Gabrielo en la vilaĝo Surdești</p> 	<p>Preĝejo de ĉefanĝeloj Miĥailo kaj Gabrielo en la vilaĝo Surdești</p> 	<p>Preĝejo de ĉefanĝeloj Miĥailo kaj Gabrielo en la vilaĝo Surdești</p> 	<p>En ortodoksa preĝejo</p> 	<p>Rokokotipa kun rumana ortodoksa kristanoj</p> 
<p>Wolfram Robloff kaj Stefan Lepping</p> 	<p>Stefan Lepping kaj rumana junularo. Rumana knabino bone parolas germanan kaj italan.</p> 	<p>Wolfram Robloff, Stefan Lepping kaj pastro Janos Roman</p> 	<p>Pastoro Wolfram Robloff</p> 	<p>Junaj rumana muzikistoj</p> 

Partoprenantoj de Bibliaj Tagoj en Baia Mare (6. – 10. IV. 2016):
Oldřich Arnošt Fischer, Felice Sorosina, Wolfram Rohloff, Pavel Polnický,
Pavol Petrik, Helga-Vanessa Tontea, Karl-Heinz Schaeffer, Norma Covelli
Cescotti, Stefan Lepping, Brigitte Horváth, Willibald Kunigk, Gabriella Stier,
Ildikó Tereza Scurt, Mária László, Francesca Tassardo, Hedwig Schaeffer

